nia voĉo

madrida esperanto-liceo aprilo 2015

## PRELEGOJ KAJ PREZENTADOJ PRI ESPERANTO

La prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio, prelegis en la sidejo de la Klubo de Amikoj de Unesko (CAUM), la 17-an de marto je la 7-a vespere. Ĉirkaŭ dudeko da homoj ĉeestis la prelegon kaj partoprenis en tre vigla debato pri nia lingvo.

Mati Montero el Madrido, ano de MEL kaj instruistino pri hispana lingvo kaj literaturo en mezlernejo IES Ciudad de Jaén, kvartalo Orcasur, en Madrido, prelegetis pri Esperanto en sia laborejo pro invito de instruisto pri Filozofio, pasintan 6an de marto. Ŝi montris al la lernantoj tradukitajn kaj originalan librojn, kaj ankaŭ aŭdigis E-muzikon.




## VIZITIS NIN

La 16an de marto, okaze de la ĉiulunda babilado de MEL, vizitis la sidejon sinjoro Nan Youli, prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio. Li donacis por nia biblioteko belan libron dulingvan pri la historio de la ĉina esperanto-movado. La sekvan tagon S-ro Nan forvojaĝis al Pollando por kelkaj tagoj sed li intencas poste reveni al Madrido kaj reviziti nin.

Dum la vizito li estis akompanita de Lisha, el Ĉinio, kiu, kiel ni komentis pasintnumere, troviĝas en Madrido por studi la hispanan.

Ankaŭ tiun tagon vizitis la sidejon du esperantistoj el Toronto, ĴG kaj Ĵeremio, kiuj turismis en nia urbo. La sekvan tagon ili ĉeestis la prelegon ĉe CAUM.

## KULTURAJ VIZITOJ

MEL petis grupan viziton al la centra sidejo de Banco de España en placo Cibeles, por la merkredo 20a de majo je la 5a posttagmeze. Ni atendas la respondon. Se ili jesos, necesos antaŭdoni la liston de la vizitontoj kun kompleta nomo kaj DNI-numero. Do, kvankam restas multe da tempo, partoprenontoj jam povas sendi siajn DNI al la adreso: manolo.parra ĉe yahoo punkto es. La vizito estos senpaga.

En tiu novklasika konstruaĵo oni konservas grandan kolekton de pentraĵoj el diversaj epokoj, inter ili ok portretoj aŭtoritaj de Goya.



Kiel ni jam komentis en pasinta numero, ĝis la 3-a de majo eblas viziti en la Nacia Biblioteko de Madrido ekspozicion pri kolektemo kun rilato al Cervantes. Inter ĝiaj eroj troviĝas la manuskripto de la unua malneto de la traduko de "La malprudenta scivolulo", fare de Luis Hernández Lahuerta, kun liaj propraj desegnoj, de li donacita al la kolektemulo Juan Sedó. Vidu apude foton de la kajereto, kaj ne hezitu viziti ĝin.

## NOVAĴO PRI MEL

Esperanto-Liceo de Madrid (MEL) ekde hodiaŭ havas konton en la banko nomata ARQUIA Caja de Arquitectos. La numero de la konto estas: IBAN: ES66 3183 2800 1700 0132 8957

La antaŭa konto ĉe Banco Sabadell ne plu ekzistas. Tiel plenumiĝas decido farita en la lasta ĝenerala kunsido.

## HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Baldaŭ finiĝos la dua aliĝperiodo por la 74-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos inter la 1-a kaj 3-a de majo en la urbo Cullera. Ne prokrastu vian decidon!

Memoru ke la detaloj troviĝas en la retejo http://esperantoval.org/cullera2015/, kie ankaŭ eblas trovi la aliĝilon al la renkontiĝo.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazos ĉiulunde post la 18,30. Ankaŭ dum la semajno de Pasko, la 30-an de marto kaj la 6.a de aprilo la sidejo estos malfermita.

En la momento de fermo de tiu ĉibulteno oni ankoraŭ ne decidis la detalojn pri tempo kaj loko de la aprila sabata babilado. Atentu forumojn kaj sociajn retojn por koni la detalojn.

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/. Ankaŭ memoru la Fejsbukan forumon de MEL http://on.fb.me/17Ocl2l, se vi uzas tiun socian reton, aŭ la pli ĝeneralan https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com